
ISSN 2072-5825

# Espero Katolika



Numero 4-6/2019

Aprilo-Junio 2019

JARKOLEKTO 116 - N. 1173-1175 - Aprilo/Junio 2019

**Sur la kovrilo:** Beatproklamo de la sep rumanaj episkopoj - martiroj

## ENHAVO


LA PAPO FRANCISKO BEATPROKLAMIS SEP RUMANAJN MARTIROJN 19

PETRO ESTAS ĈI TIE! 20

POR KE FRATECO SUPERPEZU LA DISDIVIDON 21

LA PAPO EN RUMANIO PETIS PARDONON DE ROMAOJ PRO DISKRIMINACIO KAJ MALBONA TRAKTADO AL ILI 22

KARDINALO ROBERT SARAH: LA MONDO KAJ ANKAŬ LA EKLEZIO MORTAS, ĈAR MALMULTIĜAS TIUJ, KIUJ ADORAS DION 23

LA BAPTO 24

BELEGA TRAVIVAĴO EN LA 50-A DATREVENO EKDE LA UNUA KATOLIKA E-TENDARO OKAZINTA EN LA JARO 1969 EN LA VILAĜO HERBORTICE, ĈEĤIO 25

MEMORE PRI LA 50-A JUBILEO DE LA LIBERTEMPA ESPERANTO-TENDARO EN HERBORTICE 30

SAĜULO 32



**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**

**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>

**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>

**UEA-konto "ikue-v" * Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio

IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma

n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia

ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile

Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio

tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E**.

**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Vic-Prezidanto:** Pavol Petrík - **Ĝenerala Sekretario/ Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli,Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# LA PAPO FRANCISKO BEATPROKLAMIS SEP RUMANAJN MARTIROJN

***La papo Francisko en la tagoj de la 31-a de majo ĝis la 2-a de junio 2019 vizitis Rumanion, kie li beatigis sep martirojn de komunismo, li preĝis kun ortodoksa patriarko Patronia-n kaj ankaŭ kuraĝigis la rumanan komunumon.***

***En la tria tago de la vizito de Rumanio la 2-an de junio 2019 la papo Francisko beatproklamis sep episkopojn de la grekkatolika eklezio, kiuj pro tio, ke ili rifuzis forĵuri kredon, ili estis en la jaroj 1950-1970 morttorturitaj en komunistaj malliberejoj. Kiel ili sian sorton akceptadis, pruvas la vortoj de la malliberigita episkopo Iuliu Hossu: „Dio nin sendis en ĉi tiujn tenebrojn de la suferadoj disdonadi pardonon kaj preĝi por konvertiĝo de ĉiuj.“***




La papo vizitis landon, kie inter dudek milionoj plejparte ortodoksaj loĝantoj vivas nur unu miliono kaj duono de katolikoj. Precize antaŭ dudek jaroj Rumanion vizitis papo Johano Paŭlo la Dua.

Inter dudeko de la naciecaj minoritatoj ekzistas hungaroj, sed ankaŭ ĉeĥoj kaj slovakoj. Kulmino de la tritaga vizito de la papo estis beatigo de sep grekkatolikaj episkopoj, kiujn en la jaroj de 1950 ĝis 1970 komunistoj turmentmortigis en la malliberejoj, ĉar ili rifuzis transiri al la rumana ortodokseco. „Tio, pro kio ili suferis ĝis ofero de sia vivo, estas heredaĵo tro valora, ol ĝi povus esti forgesita kaj malhonorigita,“ diris la papo unu tagon pli frue dum la renkontiĝo kun la ortodoksa patriarko Daniel, kiel raportis Vatican News. ■

## Petro estas ĉi tie!

La urbon Blaj, kie la solena dimanĉa liturgio okazis, oni kromnomas „Malgranda Romo“. Ĝi estas metropolo de la katolikoj de la orienta rito kaj ankaŭ la sidejo de la grekkatolika episkopo kaj unusola rumana kardinalo Lucian Mureșan. Tiu ankaŭ celebris pli ol duhoran solenan liturgion en la bizanca rito. La kardinalo Mureșan memorigis, kiel volis dum komunista reĝimo tiama papo Pio la 12-a „kisi la katenojn“ de la maljuste malliberigataj. Li tion skribis en la letero al la rumanaj katolikoj Veritatem facientes el la jaro 1952. „Hodiaŭ tiu ĉi lia deziro realiĝis: Petro estas ĉi tie!“ proklamis la 88-jaraĝa kardinalo kaj la 60-mila homamaso sur la placo de Libereco respondis per entuziasmema aplaŭdo. „Petro estas ĉi tie por nin firmigi en la kredo,“ aldiris la kardinalo kun nekaŝita emocio.




En la homilio post tio la Sankta Patro emfazis, ke estas grave la heredaĵon de la sep martiroj memorigadi ne nur pro la libereco, kiun ili por sia popolo akiris, sed ankaŭ pro virteco de la amo al la malamikoj: „La persistema amdeklaro al Kristo en ili estis akompanata per martirpreteco, tiel do ili siajn persekutantojn ne malkondamnadis per



malamikecaj vortoj, sed per esteca modereco. Ekzemple la episkopo Iuliu Hossu en la malliberejo deklaris: ‚Dio nin sendis en tiujn ĉi tenebrojn de la suferadoj disdonadi pardonon kaj preĝi por konvertigo de ĉiuj.‘ ■

## Por ke frateco superpezu la disdividon

Konklude de sia lasta prediko sur la rumana lando la papo Francisko la enloĝantojn kuraĝigis, por ke ili „lasu superpezi fratecon



kaj dialogon super disdivido“. La rilatojn inter la eklezioj en la lando daŭre ŝarĝas heredaĵo de komunismo kaj ne finsolvitaj



restituoj, kvankam ambaŭ komunoj havas volon por dialogi. En la jaro 1948 Stalin malebligis al la katolika eklezio funkcii (kro-





malie per konfisko de havaĵo, per aresto de 600 sacerdotoj kaj per akuzo de episkopoj pro ŝtatperfido) kaj la kredantoj estis devigitaj sin aligi al la ortodoksa eklezio. Unu jaron post tio komencis presekutado de la katolikoj de la latina rito, simile kiel en aliaj landoj sub influo de Sovetunio. Nur dum reĝimo de Nicolae Ceaușescu estis en Rumanio persekutataj du milionoj de kredantoj, dekojn el ili la tiea eklezio proponas por beatigo.



Rumanio dum tiu ĉi duonjaro prezidas la Eŭropan Union. Tial la papo en unu de siaj alparoloj akcentis progreson, kiun la lando dum sia tridekjara ekzistado de la libereco faris. Ekde la aligo de Rumanio al la Eŭropa Unio foriris el la lando pro laboro preskaŭ unu kvinono de populacio. La malkreskon precipe de junaj homoj sentas ĉiuj tieaj eklezioj. ■

*Tereza Zavadilová*

# LA PAPO EN RUMANIO PETIS PARDONON DE ROMAOJ PRO DISKRIMINACIO KAJ MALBONA TRAKTADO AL ILI



La papo fine de sia tritaga vizito de Rumanio la 2-an de junio 2019 petis nome de la katolika eklezio pardonon de romaoj pro diskriminacio, segregacio kaj malbona traktado.

„Mi petas pardonon nome de la eklezio – Dion kaj vin – pro la okazoj, kiam ni vin en pasinteco diskriminaciis, malbone ni traktis rilate vin kaj malkonfide vin traktis,“ diris la papo dum la renkontiĝo kun reprezentantoj de la romaa minoritato.



Li aldiris, ke li havis post renkontiĝo kun la lokaj loĝantoj pezan koron. „Ĝi peziĝis pro sperto de tiom da diskriminacio, segregacio kaj malbona traktado, kiujn via komunumo travivis. Historio montras al ni, ke al kristanoj, eĉ al katolikoj, tiu malbono ne estas nekonata,“ diris la papo. „Temas pri indiferenteco, kiu disponigas vivecan grundon por antaŭjuĝoj kaj samtempe ĝi ekscitas malamon,“ li daŭrigis.


Romaoj estas la plej multnombra etna minoritato en Eŭropo, kie ili vivas inter 10 ĝis 12 milionoj en multaj ŝtatoj, ekzemple en Hungario, Bulgario, Francio, Grekio, Ĉeĥio aŭ Italio. Sur la teritorio de la Eŭropa Unio ili estas ĉirkaŭ ses milionoj, kio prezentas 1,2 procentoj de ĝia populacio. ■

***La papo Francisko dum la renkontiĝo kun romaoj al ili kromalie ankaŭ diris: "Karaj gefratoj, vi kiel homoj devas esti aktantoj. Vi ne devas timi sciigi kaj proponi viajn specifajn trajtojn, kiuj vin formas kaj ni ilin tre bezonas: la sencon por valoro de la vivo kaj por familio en larĝa senco (gekuzoj, geonkloj...), solidareco, gastemeco, helpo, subteno kaj protekto de tiuj plej malfortaj kadre de via komunumo, respekteco kaj estimo rilate al maljunuloj, kio estas via granda valoro, religia perceptado de la vivo, spontaneeco kaj ĝojo pro vivo. Ne senigu la komunumon, en kiu vi vivas, pri tiuj donacoj kaj ankaŭ vi volonte akceptadu ĉion bonan, kion al vi povas aliaj proponi kaj alporti. Tial mi volas instigi vin, ke vi kune iru, kaj kreadu tie, kie vi estas, pli homecan mondon, ke vi superadu timon kaj suspektemon, ke vi lasu fali barierojn, kiuj disigas vin de la aliaj, kaj ke vi vivu reciprokan konfidon en pacienca kaj neniam vana strebo pri frateco. Strebi kune vojiri, kun digneco, digneco en la familio, digneco, kun kiu vi perlaboras ĉiutagan panon – jes, ĝi estas tio, kio vere ebligos al vi iri antaŭen – kaj ankaŭ kun digneco en la preĝo kun rigardo ĉiam fiksita antaŭen."*** ■

# LA MONDO KAJ ANKAŬ LA EKLEZIO MORTAS, ĈAR MALMULTIĜAS TIUJ, KIUJ ADORAS DION

**Kardinalo Robert Sarah**

„Okcidenta mondo konsumiĝas, ĉar ĝi rifuzas akcepti Dian mizerikordon,“ konstatis kardinalo Robert Sarah dum konferenco en pariza preĝejo de sankta Francisko Ksavera mallonge post tio, kiam li vizitis per incendio dezertigitan katedralon Notre Dame.



„La Okcidento savon ne volas, ĉar ĝi mem volas ĝin ekkonstrui. La valoroj, pri kiuj klopodas UNO (Organizo de unuiĝintaj nacioj) esti kiel fundamentaj, estas bazitaj je rifuzado de Dio. Ĉi tie mi vidas paralelaĵon kun riĉa junulo el evangelio,“ plu diris la prefekto de la Kongregacio por Dia Kulto kaj Sakramentoj. „Dio rigardis Okcidenton kun amo, ĉar ĝi faris mirindaĵojn. Li invitis ĝin iri pluen, sed la Okcidento reiris. Ĝi preferadas riĉecon, por kiu ĝi povus estis dankema nur al si mem. Grandaj okcidentaj katedraloj estis konstruitaj per homoj, kiuj havis grandan kredon eĉ humilecon kaj ili estis feliĉaj, estante infanoj de Dio. Tial la katedraloj estas kantoj de ĝojo, himnoj de Dia gloro, skulptitaj en ŝtono kaj enpresitaj en vitraloj. Kreis ilin infanoj, kiuj adoris la ĉielan Patron. Ĉiuj entuziasme ĉizis en ŝtononesprimon de sia fido kaj amo al Dio, kaj ne por gloro de sia propra nomo. Celo de ilia arta kreado estis laŭdi kaj glori Dion. Moderna okcidenta homo estas tro malĝoja, ol ĝi povus realigi similaj artverkojn,” diris la vatikana kardinalo kun aludo pri voĉoj, kiuj post incendio de la pariza katedralo vokis por ekkonstruo de la tute nova sanktejo.

„Multaj tiel parolis jam antaŭ eksplodo de la incendio,“ daŭrigis la kardinalo Sarah. Nuna konstruaĵo onidire jam plenumis sian celon, ni ekkonstruu ion novan. Kaj simile oni parolas ankaŭ pri la katolika eklezio. Oni diras, ke la eklezio ne plu estas kredinda, ne eblas pri ĝi aŭdi en la amaskomunikiloj. Ĝi estas skuita pro skandaloj de pedofilio kaj samseksemeco ĉe klerikularo. Estas necese anstataŭigi ĝin, krei ĝin denove. La evangelia moralo onidire estas tro postulema, ni plifaciligu ĝin! Ni malkoncentrigu ĝin per relativismo kaj laksismo. Ni prefere interesiĝu pri socialaj aferoj. La katolika instruo ne konvenas por amaskomunikiloj, ni ĝin ŝanĝu kaj ni akceptu tutmondiganetikon de UNO kaj gender-ideologio. Ni do faru el eklezio homan kaj pli horizontalan komunumon, kiu estos pli medialeca kaj pli popoleca!

Karaj geamikoj – diris la gvinea kardinalo – tia eklezio neniun interesas. Por la mondo tia eklezio estas por nenio, kiu proponas nenion alian ol rebrilon de ĝia propra imago! La eklezio estas do interesa nur tial, ke ĝi perigas al ni renkontiĝon kun Jesuo. Ĝi estas legitima nur per tio, ke ĝi malsekretigas al ni Dion. Se la eklezio estos superŝutita per homaj strukturoj, ĝi mallumigos la lumon de Dio, kiu elradiis el ĝi. La eklezio devus esti kiel katedralo kaj senĉese celadi nian rigardon al Dio, kiel tureto montranta al ĉielo.

Kardinalo Sarah instigis al rekonstruo de la katedralo Notre Dame. „Sed ĝi devas

esti renovigita precize tiel, kia ĝi estis. Ne estas necese inventi novan eklezion. Ni bezonas konvertiĝi, por ke la eklezio povu denove ekbrili kaj esti denove katedralo, kiu kantas Dian gloron kaj alkondukas homojn al Dio. Kio do estas la unua paŝo? Mi tion diros rekte senhezite. Se ni volas rekonstrui eklezion, ni devas genuiĝi. Ĉu vi volas rekonstrui tiun belegan katedralon, kiu estas la katolika eklezio? Genuiĝu! La katedralo estas antaŭ ĉio loko, kie homoj genuiĝas antaŭ Dio ĉeestanta en la Plejsankta Sakramento. La plej urĝa tasko, antaŭ kiu ni staras, estas renovigo de sento por adorado! Perdo de la sento por adorado al Dio estas fonto de ĉiuj incendioj kaj krizoj, kiuj skuigas la mondon kaj eĉ la eklezion. Estas bezonataj tiuj, kiuj adorkliniĝas antaŭ Dio. La mondo kaj ankaŭ la eklezio agonias, ĉar malmultiĝas tiuj, kiuj adorkliniĝas antaŭ Dio. La eklezio estas sekega, ĉar mankas tiuj, kiuj mildigas ĝian soifon," deklaris la kardinalo Robert Sarah dum la prelego, kiun li prezentis fine de majo (25.5.2019) en la pariza preĝejo de la sankta Francisko Ksavera. ■

*www.vaticannews.va/cs.html, 25.6.2019*

## LA BAPTO

Ĉu havas sencon nuntempe ankoraŭ bapti? Tiel demandas certe multaj gepatroj eĉ tiuj, kiuj pri tiuj ĉi faktoj konsideras. Ŝajnas, ke preskaŭ estas egale, se iu estas baptita aŭ ne. La baptitoj kaj nebaptitoj vivas sian vivon kaj ne unufoje la homo ekpensas, ke en tio estas neniu diferenco, kial do ankoraŭ hodiaŭ bapti? Se mi preterlasos, ke la bapto estas granda Dia graco, kiu efikas en la vivo de la baptito, eĉ se kun ĝi tiu homo ne kunlaboras, do la principa diferenco inter la baptito kaj nebaptito ekestas en la momento de la morto. La bapto estas la enirbileto en la ĉielon. Se iu laŭ la bapto vivis, tio signifas, ke li forrifuzas malbonon kaj fidas al Dio – do vivas kiel amiko de Dio, poste lin atendas brilega elekto – la eterneco.

Estas klare, ke Dio havas certe ankaŭ aliajn kromordinarajn eblojn, danke al kiuj Li povas savi por la ĉielo eĉ iun, kiu tiun ĉi enirbileton de la bapto ne havas. Sed estus tre aŭdace kalkuli pri tio, ke ĝuste por mi aŭ mia infano validos tiu ĉi escepto. Malebla tio ne estas, sed lasi la plej gravan aferon en la vivo – la eternecon – pendi sur tiel necerte ebla privilegio, estas tre malsaĝa. Tial decidiĝi por la bapto kaj la vivo laŭ ĝi estas en la plena senco de la vorto brilega decido.

Krom pluaj avantaĝoj, kiujn la baptito havas, meritas la aludon ankoraŭ tio ĉi: Al la homoj ŝajnas, ke en la mondo ekzistas multe da malbono kaj ofte, ke ĝi eĉ superas la bonon, sed fakte Jesuo Kristo jam venkis la malbonon, kaj lia venko estas senkondiĉa kaj nerefutebla. Ĉiu malbono estas ĉi tie nur dumtempa, kaj tiuj, kiuj iros kun ĝi, estas sur la flanko de la venkitoj. Per la bapto la homo envicigas sin inter la venkintojn, sen siaj meritoj li povas havi utilon el grandioza venko de Kristo, kiu koncernas ĉiujn, kiuj pere de la bapto kaj la vivo laŭ ĝi estas liaj amikoj.

Kiu el vi ne volus estis en la venka teamo? Per la bapto ni estas en ĝin envicigitaj. Dependas nur de ni, ĉu ni tiun ĉi kuniĝon kun Kristo konservos.

Esti venkinto estas brila elekto. Certe eblus aldoni ankaŭ pluajn motivojn, kial estas taŭga akcepti la bapton kaj vivi laŭ ĝi.

Ni pripensu tion, en tiu ĉi spirito ni estimu nian bapton kaj tiuj, kiuj ankoraŭ ne estas baptitaj, ke danke al ni ceteraj povu ekkompreni, kiel grandega ŝanco kaj brilega elekto al ili pere de la bapto estas proponata. Ni vivas en la periodo de la graco, kiu ne estas senfina. Tial ni eluzu proponitan ŝancon kaj denove ni malkovru la bapton. ■

*Sac. Marek Dunda*

# BELEGA TRAVIVAĴO EN LA 50-A DATREVENO EKDE LA UNUA KATOLIKA E-TENDARO OKAZINTA EN LA JARO 1969 EN LA VILAĜO HERBORTICE, ĈEĤIO

Sabaton la 22-an de junio okazis renkontiĝo de la ekstendaranoj en la 50-a datreveno post ĝia unua okazigo en la jaro 1969 en la vilaĝo Herbortice, Ĉeĥio. Arangantoj de la renkontiĝo estis Miluše Jílková – filino de geedzoj Minář en Herbortice, iamaj posedantoj de la gastejo, kiuj dum naŭ tie okazintaj tendaroj kuiris por la tendaranoj bonegajn tagmanĝojn, kaj frato Miloslav Šváček, tiama organizanto kaj estro de la tendaroj. La renkontiĝon partoprenis 45 ekstendaranoj kaj 10 akompanataj personoj. Jes, temas pri rekorda nombro post tiel longa tempo malgraŭ tio, ke multaj ekstendaranoj jam transpaŝis sojlon de la eterneco, kaj al multaj ĝis nun vivantaj la sanstato ne permesis ĉeesti. Tiu ĉi surpriza nombro da ĉeestantoj atestas pri la fakto, ke iliaj restadoj en la naŭ okazintaj tendaroj dum la totalisma ŝtata sistemo postlasis neforgeseblan memoron en iliaj koroj pri la belege en Dia amo travivitaj tendaraj tagoj. Ni koncize memorigu al ni ekeston de tiuj ĉi niaj tendaroj.



*La ekstendaranoj episkopo Antonín Basler kaj la pastro Dominik Savio Řičica bonvenigas alvenantojn*

Marte, en la jaro 1969, jam sub pafiltuboj de rusaj tankoj, okazis en Brno Konstitua Kongreso de Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Mi ne intencis partopreni la kongreson, sed mallonge antaŭ ĝia okazigo mi eksentis fortan internan voĉon, kiu diris: "Vi nepre devas veturi al Brno!" Dum la kongreso merite de karmemora frato Aleš Berka estis fondita Katolika (IKUE) Sekcio. Kiel prezidanto estis elektita frato Aleš Berka. Kadre de la sekcio mi ricevis funkcion de junulara gvidanto. Tuj post la kunveno alparolis min frato Josef Kobza (tiutempe razisto, pli poste ĝis nun sacerdoto) per demando: "Kion ni aranĝos?" Mi tuj respondis: "Ja tendaron!". Estis decidite, do okazos la Katolika (IKUE) E-Tendaro. Frato Kobza proponis, ke ĝi okazu en lia loĝvilaĝo Herbortice. Estis do dividitaj taskoj: frato Kobza prizorgos tendarejon, manĝeblecojn kaj ĉion kun tio ligi-



*La ekstendaranoj kolektiĝintaj sur la iama tendarloko en la vilaĝo Herbortice*

tan. Mi ricevis taskon varbi partoprenantojn kaj prizorgi ĉion necesan por kursoj de Esperanto kaj por la tendaraj programoj. Do tiel okazis de la 9-a ĝis la 17-a de aŭgusto 1969 la unua tendaro de Herbortice. Entute okazis naŭ tieaj katolikaj E-tendaroj ĝis ilia perforta likvido fare de fifama komunista polico en la jaro 1977. Nun ni revenu al la sabata renkontiĝo de la ekstendaranoj.



*Lastaj momentoj sur la tendarejo kun ekstendaranoj episkopo Mons. Antonín Basler kaj pastro Josef David*

Sabaton matene la 22-an de junio 2019 antaŭ la 9-a horo kolektiĝis en la provizora herbeja parkejo proksime de la iama tendaro el diversaj lokoj de nia lando kaj eĉ el Slovakio la ekstendaranoj, kelkaj kun siaj familiaj akompanantoj. Ĉiun alveninton per rideto kaj manpremo bonvenigis nia karega ekstendarano Mons. Antonín Basler – la helpepiskopo de Olomouc. Kun li al la renkontiĝo el Olomouc venis ankaŭ la ekstendarano dominikano Savio Řičica. Ĉiuj alvenintoj tra la arbara vojo transŝoviĝis al la iama tendarejo – la loko en la Dia naturo sanktigita per la tendaraj mescelebroj de pastroj Ladislav Škrňa, Vojtěch Srna kaj Józef Zielonka el Pollando. Kompreneble okazis reciprokaj bonvenigoj. Alvenis ankaŭ plua ekstendarano pastro Josef David. Kaj por la reciproka interbonvenigo ni kantis bonvenigan kanton.

Multaj inter la partoprenantoj trovis siajn iamajn tendarajn geamikojn, do okazis diversaj interbabiladoj. Kompreneble estis necese fari foto- aŭ video-dokumentojn (vidu foton sur la dua kolora kovrilpaĝo). La tempo tie rapide pasis kaj ni ankoraŭ kantis la kanton „Saĝulo“, kiun ni ĉiam en la tendaro kantadis, kaj kiun ekde tiam ne forgesis nia karega pastro Battista Cadei el Italio, kiu kun sia kolego pastro Arturo Bellini en la jaro 1973 la tendaron partoprenis.

Kaj maturiĝis tempo por adiaŭi la tendarejon, la lokon, kiu profunde enskribiĝis en niajn korojn, kaj translokiĝi en la paroĥan preĝejon en la vilaĝo Cotkytle, al kies paroĥo apartenas vilaĝo Herbortice, kaj kiun bone la ekstendaranoj memoras. Nur en la unua kaj la lasta el naŭ tendaroj estis la sanktaj mesoj celebritaj rekte en la tendaro. Do dum sep tendaroj la tendaranoj ĉiam frumatene perpiede (anstataŭ matena gimnastiko) venadis al la preĝejo en Cotkytle por tie partopreni la sanktan meson. Kaj sabaton la 22-an de junio tie okazis por la partoprenantoj de la renkontiĝo (kaj por ĉeestantaj vilaĝanoj) la sankta meso, kies ĉefcelebranto estis nia



*La sankta meso okazis en la paroĥa preĝejo en proksima Cotkytle*

karega ekstendarano – episkopo Mons. Antonín Basler. Kuncelebris la sanktan meson pastroj ekstendaranoj Dominik Savio Řičica kaj Josef David. Komence de la sankta meso la episkopon Toník kaj la ĉeestantajn ekstendaranojn bonvenigis la vicprezidantino de la vilaĝo Cotkytle s-ino Beranová. Dum kaj per



*La bonveniganta vicprezidantino s-ino Beranová*

la sankta meso ni petis Dion por la ĉeestantaj ekstendaranoj de la renkontiĝo, por danki Dion pro la ricevitaj gracoj kaj Di-donacoj dum ĉiuj tendaroj, por ekstendaranoj, kiuj pro sanproblemoj aŭ aliaj gravaj kaŭzoj ne povis ĉeesti, por ĉiuj bonfarantoj de la tendaroj, sed ankaŭ por tiuj, kiuj likvidon de la tendaro ordonis kaj ĝin realigis kaj por la ekstendaranoj, kiuj nin antaŭiris en la eternecon. Por pli bone memorigi la tendarajn restadojn, dum la sankta meso estis kantitaj ritmaj kantoj, de ĉiuj konataj el la tendaroj. La kantadon per gitarludo kaj ankaŭ per orgenludo akompanis kantgrupo el najbara paroĥo Štíty. Tiucele estis preparita por ĉiuj ĉeestantoj kantareto. Konklude de la sankta meso prezentis sian dankparolon kunorganizantino de la renkontiĝo fratino Miluše Jílková – filino de geedzoj Minář el Herbortice. Jen ŝia alparolo:

"Estimata kaj kara patro episkopo Antonio, estimataj kaj karaj fratoj pastroj Jozefo kaj Savio, estimataj ekspartoprenantoj de la katolikaj E-tendaroj en Herbortice, karaj paroĥanoj kaj gastoj.

Estas por mi honoro kaj ĝojo stari ĉi tie hodiaŭ antaŭ vi, por ke mi el profundo de la koro danku precipe al la Sinjoro Dio por tiu ĉi nia kuneco.

Oktobron 2017, ĝuste en la tago de mia naskiĝdatreveno, mi ĉeestis al Dio plaĉan eklezian solenon en Olomouc, kie okazis episkopa ordino kaj vokiĝo al la episkopa servo de unu el la esperantistoj de la tendaro de Herbortice, la hodiaŭ ĉi tie ĉeestanta episkopo Mons. Antonín Basler. Tiuokaze tie renkontiĝis ankaŭ grupo de ekstendaranoj por ĝoji kun ĉiuj, ke la Sinjoro invitis al la episkopa servo nian karan Toník, kiel ni lin ĉiam nomis. Ni tiam ankaŭ rememoris la fatalan 40-an datrevenon de la perforta finigo de la kristana tendara komunumo fare de servantoj de la tiama totalisma politika reĝimo. Ĉar mi tiam estis jam matura virino, estas tio por mi rememoro por la tuta vivo, konstante mi havas tiun eventon antaŭ miaj okuloj. Mi ne povis ekkompreni kial! Kial por iuj estis neakceptebla kuneco de la bonkondutaj homoj, kiuj faras neniujn damaĝojn? Kial estis per tiuj servantoj de la totalisma reĝimo demandesploritaj kaj punitaj homoj, kiuj faris multan bonon, kiel estis



la tiama tendarestro kaj hodiaŭ ankaŭ ĉi tie ĉeestanta frato Miloŝ, pastro Vojtěch Srna, mia patro kaj pluaj homoj de la altaj moralaj kvalitoj, kiuj per sia ekzemplo kaj bonkoreco disvastigadis vicojn de la favorantoj? Hodiaŭ mi jam konas respondon. Kiel oni

diras en Moravio, en kiun mi edziniĝis, la Malbona Spirito, la Satano klopodis tre forte transpreni ĉiun potencon, kaj tiel li faris kaj faras malbonon ĉie, kie tio nur eblas. Ĉu vi opinias, ke li sukcesis? Mi opinias kaj kredas ke ne. Nia Dio, la amata Jesuo Kristo amas nin kaj neniam Li permesos al la diablo nin regi. La amo estas pli forta ol malbono, tial ni dankemu Jesuon kaj neniam ni ĉesu Lin ami.



*Finan dankalparolon faris Miluše Minářová*

Karaj gefratoj en Jesuo Kristo, nunjare pasos 50 jaroj ekde la tempo, kiam niaj civitoj Herbortice kaj Cotkytle kaj eĉ la najbara ĉirkaŭaĵo regule en la tempo de someraj ferioj dum naŭ jaroj viviĝis per ĉeestado de homoj, kiuj sur ĉiu paŝo disdonadis ĝojon, korecon, komplezon kaj amon. Ne malgrandan meriton pri la ekesto kaj bonorda funkcio de tiuj tendaroj havis, kiel mi jam menciis, ilia gvidanto frato Miloŝ Šváček, kaj eble multaj el vi scias, ke ankaŭ nia ekscivitano, la aktiva esperantisto, estimata Patro Ksavero Jozefo Kobza kaj ne lastvice ankaŭ miaj gepatroj, al kiuj mi dankemas pro transdonita donaco de la kredo, ĉar sen tio ni en tiu ĉi hodiaŭa kuneco ne estus. Niaj rememoroj estas belegaj, profundaj kaj akompanantaj nin dum la tuta vivo.

Estimata kaj kara patro episkopo, estimataj fratoj pastroj, akceptu nome de la paroĥanoj kaj ceteraj samvilaĝanoj sinceran Dio repagu por via mescelebro honore al la Sinjoro Dio en nia preĝejo en Cotkytle, konsekrita al la sankta Johano Nepomucena. Koran Dio repagu al la patro episkopo por rememoroj dum lia homilio.

Ĉar tio ĉi estas jubilea, solena renkontiĝo de la partoprenintoj de la Katolika E-Tendaro en Herbortice el la jaroj 1969 - 1977, mi elkore dankas antaŭ ĉio al vi, la ekstendaranoj, kiuj hodiaŭ venis inter nin rememorigi belajn tempojn. Mi dankas al vi pro grandega amikeca etoso, kiun vi ĉi tien ĉiam alportadis, pro via homeco, kaj mi persone dankas al ĉiuj pro longdaŭra amikeco kaj al la Sinjoro Dio pro vi la ĉeestantoj, ankaŭ pro tiuj, kiuj pro malbona sanstato aŭ aliaj gravaj kaŭzoj ne povis veni ĉi tien, sed ankaŭ pro tiuj multaj, fidelaj tendaranoj, kiuj jam antaŭiris nin en eternecon. Kiel tre mi deziris esti inter vi dum la tendaroj! Bedaŭrinde tio ne estis ebla, ĉar mi interkonsentiĝis kun mia patrino, ke ni ion bongustan preparos por viaj ĉiutagaj tagmanĝoj, por ke vi en Herbortice estu kontentaj. Ankaŭ mi dankas al la ĉeestantaj paroĥanoj kaj al ĉiuj mi deziras abundajn Diajn benojn kaj ŝirmon de la Virgulino Maria.

Fine mi transdonas florbukedon okaze de la hodiaŭa jubileo kaj aldone ankoraŭ al okazinta ordino al la patro episkopo Antonín



kaj ankaŭ al aktivaj organizantoj de multaj Esperantaj renkontiĝoj, al la eksgvidanto de la tendaroj Miloslav Šváček kaj al ĉiam tre aktiva ekstendaranino Ludmila Rašnerová.

Mi scias, ke la bukedo trovos sian lokon ĉe tiuj, kiuj vin dum la vivo akompanas kaj danke al ili kaj al Dio vi estas hodiaŭ inter ni. Dio repagu al vi ĉion!"

Kaj post la fina beno de la episkopo Toník kaj la pastroj Savio kaj Jozefo ankoraŭ okazis en la preĝejo komuna fotado. Nu kaj post tio ĉiuj translokiĝis al Herbortice, kie en la gastodomo „na Mlýně" okazis tagmanĝo kaj posttagmeza programo ĝis la 18-a horo. Komence de la posttagmeza programo estis tralegita saluto kaj bondeziro de la prezidantino de IKUE fratino Marija Belošević kaj de kelkaj geekstendaranoj nepovintaj la renkontiĝon ĉeesti.

Kaj ankaŭ estis tralegita salutletero de la karega pastro Battista Cadei el Italio, kiu en la jaro 1973 partoprenis la tendaron kun sia kolego pastro Arturo Bellini.

Ankaŭ estis projekciita prezentaĵo pritraktanta historion de ĉiuj naŭ tendaroj kaj ĝiajn sekvaĵojn. Kaj certe la atenton de ĉiuj kaptis ankaŭ prezentaĵo el la episkopa ordino de nia karega ekstendarano Antonín Basler kaj lia kolego Josef Nuzík okazinta la 14-an de oktobro 2017 en la urbo Olomouc. La tempo de la belega renkontiĝo rapide proksimiĝis al la fino. Estis necese adiaŭi karegajn geamikojn kaj la gastigantan vilaĝon Herbortice, kiu enskribiĝis profunden en la korojn de la ekstendaranoj. Dum adiaŭo ne mankis ankaŭ demandoj: Ĉu ni iam denove renkontiĝos? Tion ni do metu dankeme en la manojn de Dio.

**Al la partoprenantoj de la memor-renkontiĝo okaze de la 50-a datreveno de la Katolika Esperanto-Tendaro**

Estimata patro episkopo, estimataj partoprenantoj de la renkontiĝo, akceptu miajn bondezirojn okaze de la 50-a datreveno ekde la komenco de la organizado de la Katolika Esperanto-Tendaro en la vilaĝo Herbortice en la jaro 1969.

Certe estas por vi kortuŝe viziti la lokon, kiu donis gravan impulson al viaj vivoj precipe dum la kruela parto de la 20-a jc., kiun markis totalismaj reĝimoj, inter kiuj la komunismo estis la plej longedaŭra.

Jes, oni devas iri antaŭen, sed tamen necesas al la novaj generacioj konsciigi kiel lerni kaj vivi verajn valorojn. Vi estis bonŝancaj tion lerni dum la tendaraj tagoj. Estu fieraj pri tio! Dio benu!

***Marija Belošević, prezidantino de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista***

Kaj fine ankoraŭ el leteretoj de almenaŭ du gepartoprenintoj de la renkontiĝo kun E-traduko:

*„Milunjo kaj Miloŝ, ankoraŭ unufoje grandan dankon pro la bela sabato. Ne multaj kapablas imagi, kiel granda strebo por vi estis preparo de tiel bela kaj senproblema renkontiĝo. Fartu tre bone kaj travivu belajn momentojn dum belaj tagoj. Jiří Gazárek"*

"*Ankaŭ mi plu vivas per Herbortice, es-*



*tis tio mirinda, vere benita, bela renkontiĝo. Al ĉiuj ĝi tre plaĉis. Ankaŭ mi estis pro tre belega florbukedo kortuŝita... Tia beleco!!! Neniam en la vivo mi ricevis tiel belegan bukedon. Ludmila Rašnerová"*

Sekvan dimanĉon mi la belegan florbukedegon enmetis en la florvazon kaj kiel dankesprimon al Dio pro la sabata bela renkontiĝo mi la vazon starigis antaŭ altaron en nia paroĥa preĝejo de la sankta Petro kaj Paŭlo en Penčice.

Kaj ankoraŭ kelkaj vortoj konklude. Dum la nebonvenata vizito de la tendaro fare de la anoj de la fifama komunista polico la 21-an de julio 1977, mi, kiel tendarestro kaj organizanto de la tendaro estis forveturigita al la vilaĝo Cotkytle por multhora demandesplorado en la oficejo de la vilaĝa komitato. Tiam la demandesploristo kriis al mi: „Ĉu vi konsciiĝas, kiel longe daŭros, ol tiuj gejunuloj liberigos sin de la tendara influo?" Tiam mi ekpensis: Dio, donu, ke tio daŭru longe. Se li tiam scius, ke eĉ post 42 jaroj kolektiĝos sur la sama loko en Herbortice 45 ekstendaranoj, li tion apenaŭ transvivus.

Krom la sabata soleno de la kvindekjara datreveno ekde la unua tendaro, mi festis ankoraŭ alian gravan datrevenon: kvardek jarojn post la juĝproceso en la jaro 1979. La dua juĝa ĉeftraktado okazis la 18-an de majo 1979, do ĝuste en la naskiĝdatreveno de la papo Johano Paŭlo la Dua, kiu tiutempe estis en Pollando. Irante tiutage al juĝejo en la urbo Ústí nad Orlicí, mi unue vizitis preĝejon por transdoni la tutan juĝtraktadon en la manojn de Jesuo Kristo kaj la Virgulino Maria. Ĉion, kio tiutage okazos, mi tiam dediĉis al la karega papo Johano Paŭlo la Dua okaze de lia naskiĝdatreveno. Kaj tiel fortigita mi povis tute trankvila aliri tribunalan senaton. Kiu volas pli bone ekkoni tiujn okazintaĵojn, tiu bv. viziti interretajn paĝojn de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio: http://www.ikue.org/cz/ ■

*Miloslav Šváček*

## MEMORE PRI LA 50-A JUBILEO DE LA LIBERTEMPA ESPERANTO-TENDARO EN HERBORTICE


### «Saĝulo konstruis domon sur la rok'!»

***Salutletero de pastro Battista Cadei, Bergamo (Italio), 22 junio 2019***

Respektinda Episkopo Antonín, estimataj Kunpastroj, karegaj Miloŝ kaj eks-Tendaranoj!

Ĉi tiu kanto (Saĝulo), kiun mi ekaŭdis, alveturante al la tendaro julie de 1973, neforgeseble reeĥas en mia memoro. Laŭ la Jesuaj vortoj: "Ĉiu, kiu aŭdas ĉi tiujn miajn parolojn kaj plenumas ilin, estos komparata al saĝa viro, kiu konstruis sian domon sur roko" (Mat 7,24), tiu kanto esprimas la firmecon de la kristana kredo, predikata kaj praktikata en Herbortice naŭfoje, dum la ĉiovida, ĉioscia, ĉiopova ateisma sekreta ŝtata polico nenion vidis, ĉar longtempe neniu denuncis.





*Pastroj Battista Cadei kaj Arturo Bellini 1973*

Mi estis korespond-amiko de Miloŝ, kiu al mi skribis pri kaŝe kristana E-tendaro, kiun li gvidadis jam 5-an jaron. Mi decidis alveturi kun amiko pastro Arturo (li forgesis E-on, do mi skribas ankaŭ lianome: li korege salutas vin kun ceteraj italaj pastroj). Ni pretigis dokumentojn: ĉe la demando

"profesio" ni kaŝis nian pastrecon. Per eta aŭto ni faris aventuro-plenan veturon. Mi klopodis demandi pri vojo ruslingve; demanditoj respondis afable, sed ĉeĥe: mi ne sciis, ke ĉeĥoj tiam ne ŝatis la «fratajn» rusojn. Fine iu soldato respondis en flua rusa lingvo: verŝajne li estis ano de la «okupacianta» "Ruĝa Armeo".


*Bonvenigan ceremonion realigas frato Láďa Mlejnek*

En Herbortice ni, esceptaj okcidentaj gastoj, estis akceptitaj tute honore. Admirindaj estis la disciplino, preĝemo, gaja laboremo kaj helpemo de tiuj geknaboj. Ĉia religia faro estis tute malpermesata. Pri la tendara religia aktivado ĉiuj sciis, inkluzive de la lokaj komunistoj (kiuj, demandite de la polico, garantiis, ke "tiuj geknaboj estas en kompetentaj manoj"). En paroĥo Cotkytle ni celebris dimanĉan sanktan meson kaj eĉ predikis. Inter la geknaboj mi memoras pri Basler, tiam 17-jara: serioza, sindona, preĝema. Pri li mi nenion plu sciis; nur antaŭ nelonge mi legis en DIO BENU, ke li fariĝis kaj pastro kaj episkopo. Estu salutata!

Post 4 jaroj okazis denunco. Sekve de tio, en 1977 pluraj aŭtoj kun aro da policanoj invadis la tendaron, terorigis la geknabojn kaj likvidis ĝin. Longajn demandesplorojn suferis la tendarestro. Kulpigantoj al li diris, ke lia «krimago» estas ege puninda, sed li trovos indulgemon, se nur li kulpigos sin mem: temus pri fifama memkritiko, kutima ĉe la Stalinaj juĝprocesoj. Tio signifus sin fuŝi propramane; tial Miloŝ, neatendite kaj kun embaraso de l' kulpigantoj, petis laŭleĝan juĝproceson. Pro timo neniu advokato akceptis fari lian tribunalan pledon. Sed Jesuo diris: «Decidu en viaj koroj, ne prizorgi antaŭe pri pleda respondo; ĉar mi donos al vi buŝon kaj saĝon, kiun ĉiuj viaj atakantoj ne povos rezisti nek kontraŭdiri» (Luk 21,14-15). Tio fakte okazis. Eksterlande okupiĝis pri li i.a. Amnesty International kaj Radio Vatikana (ĉeĥa, slovaka kaj Esperanta programoj). En ambaŭ proces-tagoj (1978) Miloŝ pledis por si mem, surbaze de la fina Akto, kiun subskribis en Helsinki (1975) la Konferenco por Sekureco kaj Kunlaboro en Eŭropo, ratifikita, sed ne plenumata far la ĉeĥoslovaka registaro. Laŭ tiu Akto «ĉiu rajtas je libereco de penso, konscienco kaj religio». Ĉi tiel li pruvis, ke kulpas ne li mem, sed tiuj, kiuj subpremas la menciitajn liberecojn. Politike antaŭ-fiksita verdikto por li estis tri jaroj kaj duono de karcero, sed pro internacia protestkampanjo ĝi estis mallongigita je 15 monatoj kun kondiĉita trijara provtempo.

Sed novembre de 1989 okazis senperforta "velura" Revolucio. La komunismo, laŭŝajne tiel fortika, malaperis kvazaŭ neĝo sub suno. Venis libereco, kaj ĉe vi nova erao. Sed kristanoj frontas al pluaj defioj. Johano


*Karegaj italaj gastoj pastroj Battista Cadei (maldekstre) kaj Arturo Bellini (dekstre). Dua de maldekstre estas frato Ladislav Mlejnek kaj tria pastro Smištík, tiutempe laboristo, ĉar komunistoj malpermesis al li plenumi sacerdotajn servojn. Knabo estas Mirek Šváček, filo de la tendarestro.*

Paŭlo II-a substrekis, ke post komunisma ateismo, fakta materiismo kun aliaj nekristanaj aferoj trafas kaj Okcidenton kaj Orienton. Eble ankaŭ ĉe vi regas sekularizado, laikismo, framasonismo, fermo de landlimoj malakcepte de migrantoj, malpliiĝo de pastraj vokiĝoj. Ĉefe malfacilas transdoni la kredon al geknabaj kaj junaj generacioj. Papo Francisko, post la monda Sinodo de junuloj (03-28.10.2018), skribis postsinodan Admonon (25.03.2019), kiu instigas ĉiujn junulojn fariĝi por samaĝuloj amikaj heroldantoj de la amo de Jesuo: «Kristanismo ne estas aro da kredendaj veroj, da plenumendaj leĝoj, da malpermesoj. Ĉi tiel ĝi efikas repuŝe. Kristanismo estas la Persono, kiu amis min tiagrade, ke tio postulas mian reamon. Kristanismo estas Kristo» (N°157).

Dum la komunisma reĝimo pro tio, ke pastroj estis malebligitaj, kristanaj laikoj aktivis, ekz. por distingi, pritaksi kaj akompani pastrajn vokiĝojn (vidu Basler). Nuntempe pastraj vokiĝoj ĉie malpliiĝas: do viraj kaj inaj laikoj, junaj kaj plenaĝaj, plu estu ĉefroluloj ĉe evangelizado kaj animzorgado! Kaj vi plu kantu: ***Saĝulo konstruis domon sur la rok'***!

**Kristane kaj frate mi vin salutas bondezirante: DIO BENU!**

Kore via ***Sac. Battista Cadei*** ■

## SAĜULO




2. Sur sablo konstruis domon frenezul´, / sur sablo konstruis domon frenezul´, / sur sablo konstruis domon frenezul´, / poste venis granda pluv´. / Pluvegis kaj akvo levis sin, / pluvegis kaj akvo levis sin, / pluvegis kaj akvo levis sin, / kaj la domon forportis.